# Moma

Moma estas krelingva projekto M23 de Viktor Medrano. Ĝi estas futureska pliboniĝo de la angla kun reguligata ortografio influata de la hispana kaj kreolaj lingvoj, inkluzive de Esperanto. Supozeble, la superrealisma scenaro troviĝus en la jaro 8200 en Nordameriko. Moma nomiĝas pro la Muzeo de Moderna Arto (MOMA).

## Ortografio

<a e i o u>

<w y>

<p b f v t d k g ch j s z sh zh m n ng l r h>



Mondo de Moma.

## Fonologio

La supraj literoj rilatas al ĉi tiuj fonemoj:

/a e i o u/

/w j/

/p b f v t d k g tʃ dʒ s z ʃ ʒ m n ŋ l r h/

Pli mola aŭ pli pigreska prononco estas permesebla: La grafema vokalaro <a e i o u> povus varii je la respondantaj vokaloj de la fonema vokalaro /ʌ ə ɪ ɔ ʊ/. La pli solida kontinenta fonema vokalaro /a e i o u/, tamen, rekomendiĝas...

## Ortografiaj stiloj

-ks- kontraŭ -x-

glita -w- kontraŭ -u-

glita -y- kontraŭ -i-

...kaj tiel plu.

## Fonologiaj stiloj

-a- kontraŭ -ei- aŭ -ey-

-o- kontraŭ -ou- aŭ -ow-

-i- kontraŭ -ai- aŭ -ay-

-ds- kontraŭ -dz-

-gs- kontraŭ -gz-

-ing kontraŭ -in

...kaj tiel plu.

## Ellasema gramatiko

Moma estas *ellasema* lingvo kiel la hispana kaj la japana. Pronomoj, subjektoj, objektoj, kaj tiel plu ellasiĝus kiam oni povus dedukti ilin en kunteksto aŭ kiam ili estus ne gravaj.

**Am lisening tu muzik. ?Wat duwin?**

*Mi aŭskultas muzikon. Kion vi faras?*

## Specialaj vortoj

### Vortetoj

**Na** signifas 'ne'.

**Nou** signifas 'scias'.

**Ya** aŭ **ye** signifas 'jes'.

...kaj tiel plu.

### Mallongiĝoj

Mallongiĝoj de vortoj estas oftaj:

**Dif** venas el **diferens**, kiu signifas 'diferenco', angle 'difference'.

...kaj tiel plu.

### Kuntiriĝoj

Ankaŭ kuntiriĝoj de vortoj aŭ frazoj estas oftaj:

**Kuda** venas el **kud hav**, angle 'could have'.

**Kainda** venas el **kaind ov**, angle 'kind of'.

**Wana** venas el **want tu**, angle 'want to'.

...kaj tiel plu.

## Interpunkcio

### Citaĵoj

Citaĵoj sekvas hispanajn regulojn:

**"Ai wana it a kuki", hi sed tu da farmer.**

*"Mi volas manĝi kekson", li diris al la agristo.*

Sed ne: ***"Ai wana it a kuki," hi sed tu da farmer.**

### Ekkriaĵoj

Ambaŭ antaŭaj kaj malantaŭaj interpunkcioj uziĝas en ekkriaĵoj:

**!Na, go awei!**

*Ne, foriru!*

### Demandaĵoj

Ambaŭ antaŭaj kaj malantaŭaj interpunkcioj uziĝas en demandaĵoj:

**?Du yu it bred?**

*Ĉu vi manĝas panon?*

...kaj tiel plu.

### Emfazaĵoj

Emfazataj vortoj enfermiĝas per asteriskoj:

**Ai *nou* dat da gras iz *grin*...**

*Mi ja scias, ke la greso estas ja verda...*

### Plurlingva kodŝaltado

La kodŝaltada markilo estas du dupunktoj ::, kiuj uziĝas inter frazoj aŭ vortoj de malsamaj lingvoj:

**?Wat du yu nou abaut :: guacamole :: eniwei?**

*Kion vi scias pri 'guacamole' ĉiaokaze?*

...kaj tiel plu.

## Alfabeto

La prononco de la alfabeto sekvas:

**a b c d e f g h i j k l m n o p q r s t u v w x y z**

/a be se de e ef ge etʃ i dʒe ke el em en o pe ku er es te u ve wa eks ja ze/

## Verboj

### Tensoj

La uzmetodoj de verbtensoj per Moma ne estas tiel severaj kiel per Okcidentaj lingvoj, speciale en rakontoj per Moma. Ekzistas pli da liberaj artaj influoj...

### Formoj

Oni povus interŝanĝi la pluralajn kaj singularajn verbformojn en la 3a persono...

**Hi woks der...**

*Li marŝas tie.*

**Hi wok hir...**

*Li marŝas ĉi tie.*

# Personaj pronomoj

La duapersonaj pluralaj formoj estas **yug** kaj **yugz**, kiuj venas el **yu gaiz**. La nedifinaj triapersonaj formoj estas **wan** kaj **wanz**. (La sekvantaj listoj proksimiĝas al la anglaj pronomoj.)

## Subjektaj

**ai, wi, yu, yug, hi, shi, dei, wan, hu**

## Posedaj

**mai, aur, yur, yugz, hiz, her, deir, wanz, huz**
**main, aurz, yurz, yugz, hiz, herz, deirz, wanz**

## Objektaj

**mi, as, yu, yug, him, her, dem, wan, hum**

## Seksa ambiguo

Kiam la sekso estus nekonata aŭ negrava kaj oni ne povus uzi formojn de **hi** aŭ **shi**, oni devus uzi formojn de **dei**...

# Eksteraj ligiloj

Moma [1] **angle**

# Referencoj

[1] http://purl.oclc.org/net/moma

# Artikolaj fontoj kaj kontribuantoj

**Moma** *Fonto*: http://eo.wikipedia.org/w/index.php?oldid=3214094 *Kontribuantoj*: FiorixF1, Televido

# Bildaj fontoj, licencoj kaj kontribuantoj

**Dosiero:20100820 Ringmondo.jpg** *Fonto*: http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Dosiero:20100820_Ringmondo.jpg *Licenco*: nekonata *Kontribuantoj*: Televido

# Licenco

Creative Commons Attribution-Share Alike 3.0 Unported
http://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/